


# LA JUNA VIVO

DUŜEMAJNA  
ORGANO



POR LA  
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafthijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75  
Unuobla ekz. f 0.03  
duobla ekz. f 0.06  
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

## MILITEMA FILO.

Malgraŭ siaj ses jaroj mia filo estis tre militema. Ĉie kaj ĉiam li revis nur pri la plej teruraj militiroj, kiujn povas imagi nur la plej sinceraj generaloj. Rigardante ĉe montra fenestro al ludiloj, mia Eĉjo nepre tuj trovis inter ili iun porinfanan mortigilon, kaj forte persvadis min, aĉeti por li revolveron, ponardon, tankon, kuglo-ŝprucilon aŭ aeroplanon. Neniu ludiloj allogis mian amatan Eĉjon escepte nur tiuj, kiuj povas esti uzataj en batalo.

Eĉ tiam, kiam ni promenis inter tute paciga naturo ekster la urbo, mia filo atentis nek florojn, nek arbojn, nek birdetojn, ..... Lia sola intereso koncernis nur militojn. Mi povis rakonti al li la plej admirindajn okazintaĵojn, fabelojn, fiksi lian atenton al iu rimarkinda objekto, sed nenio helpis. Post kelka silento, kiam al mi jam ŝajnis, ke Eĉjo estas finfine entuziasma por mia rakonto, li subite, kvazaŭ nenion aŭdinta, interrompis min kaj riproĉe demandis: „Nu paĉjo, kiam do fine vi aĉetos por mi pafilon? Vi scias paĉjo, mi faros tian grandan aeroplanon, kaj sur ĝi mi ĉirkaŭveturos la tutan mondon kaj detruos ĉiujn urbojn! Neniu restos viva!”

„Sed se la malamikoj mortigos vin?” provis mi timigi lin.

„Ho paĉjo, mi konstruos ankoraŭ pli grandan aeroplanon kaj eĉ tankon kiel domo! Se ilia bombo mortigos mil homojn, mia flugos eĉ ĝis la luno kaj disbatos ĝin!”

„Bone, sed se tia supera kuglo ĉe eksplodo mortpafos vin mem?”

„Oh, ne timu pri tio paĉjo. Kiam mi ekflamigos mian kanonon, mi ja mem sidos en profunda terkavo.”

Nenia kontraŭdiro povis superigi mian fi-Eĉjon. Ĉiu milita inventisto aŭ scienculo povus envii la geniajn invent-kapablojn de

mia fileto ..... verdire. „Pro kio do vi mortpafos la homojn, kiujn vi tute ne konas? Ĉu vi ne kompatos, vidante iliajn turmentojn? Ili ja ankaŭ havas patrinon!” diris mi laste, preskaŭ malespera.

„Ho paĉjo, pro kio do ili volas militi kontraŭ mi!” preskaŭ kolere rebatis li. „Mi do pafos tiel forte, ke ili tuj mortos.” kompate aldonis Eĉjo. Mi devis silenti kaj nur de tempo al tempo, dum nia promenado, aŭskulti la antaŭdirojn de mia batalema filo pri novaj militoj.

Vespere, kuŝante en la lito, Eĉjo ne forgesis sciigi min, ke li decidis konstrui el malnovaj bretoj cent aeroplanojn por ataki najbaran landon, kie loĝas lia avino. Okazis do, ke eĉ ŝi ne povis savi la landon kontraŭ liaj atakoj.

Iun matenon Eĉjo petis de mi por trajno dudek cendojn.

„Kial dudek, sed ne dekkvin?” mi demandis.

„Ĉu vi ne scias, paĉjo, ke mi jam de longe kolektas monon por aĉeti gaso-maskon? Ĝi do ne estas tiel malmultekosta kiel ĉiaj lud-il-oj!” ironie parolis la sesjara etulo.

Mi estas kontraŭmilitisto kaj pro tio mi multe pripensis, kion fari kun tia terura filo. Mi tute ne volis, ke li estu Ŝofro, Ludendorfo, aŭ eĉ Napoleono mem. Sed ne facila demando: Kiel elpeli el tia obstina sesjarulo lian armamon? Li ne estis suĉinfano!!

Post multaj pripensoj kaj provoj mi finfine decidis montri al li la militon. Facile diri! En nia tempo montri .....

Tamen ĝuste tiutempe okazis, ke estis en nia urbo tre granda kontraŭmilita amerika filmo „Generalo”. Ni tuj vizitis ĝin. Sed ĉu vi opinias, ke la filmo efikis? Bedaŭrinde tute ne! La sceno, kie la balancanta trabo ĉiusekunde minacis forŝiri la kapon de la militanta heroo, iomete tuŝis la timigitan koreton de la knabeto, sed jam sur la strato, pasante la kazernon, Eĉjo petis min forsendi lin dum tempo en la kazernon, por ke li pli bone ellernu la militarton. Nenion fari!

Evidente do estis mia sorto havi tian napoleonidon kaj mi tute ĉesigis mian pacifistan laboron ĉe mia filo.

Post kelka tempo mi komencis okupi min per Esperanto. Jam estis venintaj la unuaj korespondaĵoj kun belegaj ilustritaj poŝtkartoj kaj eĉ bildetoj por mia batalema filo. Kaj ne forpasis eĉ unu monato de mia esperantistiĝo, kiam mia filo iun vesperon, jam kuŝante en la lito, subite vokis min: „Paĉjo, mi ne ĵetos bombon sur Berlinon.”

„Kial do?” mi demandis tute surprizita pro tia neatendita kompato al la Berlinanoj.

„Ĉu vi mem ne komprenas? Tie ja loĝas via esperantista kamarado!”

„Jes, jes, fileto,” mi respondis, ĝoje, „sed ankaŭ en Hispanio kaj Anglio kaj Nederlando loĝas miaj amikoj.”

„Paĉjo, prenu vian mondatlason kaj montru, kie loĝas viaj amikoj.”

Kaj nun ĉiam ni serĉas sur la mondkarto, kie loĝas niaj amikoj.

Kaj mi havas la fortan esperon, ke baldaŭ venos la tempo, kiam li komprenos, ke tra la tuta mondo vivas amikoj de lia patro.

.....

Jen la interna spirito de la genia Zamenhofa Kreitaĵo.

Originale verkis M.

Simferopolo. Sovetio.

## LA LEPORO DE LA „GARD' A PONTO”.

(Provenca legendo.)

La Gard' a Ponto kun sia triobla arkaĵaro, estas unu el la plej admirindaj artverkoj de la mondo. Tamen oni diras, ke la diablo konstruis ĝin en la daŭro de unu nokto.

Jen la rakonto:

Iam, antaŭ tre longe, la riveron Gard, kiu estas unu el la plej rapidaj kaj perfidaj nun ekzistantaj riveroj, oni povis transiri nur vade. La ĉebordaj posedantoj iam decidis konstruigi ponton. Sed la masonisto, kiu prenis sur sin la konstruadon, ne povis fini sian laboron; tuj, kiam li ĵetis siajn arkaĵojn super la riveron, alrapidis akvofluego, kiu disrompis la ponton. Iun vesperon, kiam malgaje, li rigardas al sia ruinigita laboro, senespere li ekkriis: „Jam la trian fojon mi rekomencas, estu malbenita mia vivo! Mi fordonus min al la diablo!!!” Jen, tuj aperis la diablo en lia ĉeesto. „Se vi akceptos, mi konstruos vian ponton, kaj mi certigas vin, ke, tiel longe kiel daŭros la mondo, neniam la Gard ĝin forrompos.” „Mi akceptas!” diris la masonisto. „Kian pagon vi postulas?” „Ne multon; la unua, kiu transpasos la ponton estos mia.” „Konsentite!” diris la homo.

Kaj la diablo per siaj ungegoj kaj kornoj elfosis el la monto mirigindajn ŝtonegojn kaj konstruis grandegan ponton tian, kian oni neniam vidis.

Dume hejmen iris la masonisto kaj rakontis al sia edzino pri la traktato, kiun li faris kun Satano. „La ponto,” li diris, „estos finkonstruita morgaŭ, je frua tagiĝo. Sed ne tio plej gravas. Necesas,

ke malfeliĉa kompatindulo sin oferu por la aliaj. Kiu konsentos esti tiu viktimo?" „Nu, simplulo”, diris la edzino, „Ĵus hundo ĉaskaptis vivan leporidon. Prenu tiun leporidon kaj morgaŭ, tuj je la tagiĝo, forpelu ĝin sur la ponto.” „Vi estas prava!” respondis la edzo. Kaj li prenis la leporidon, reiris al la loko, kie la diablo ĵus konstruis sian verkegon, kaj kiam la sonorilo ektintis por la anĝeluso li forpelis la beston sur la ponto. La diablo, kiu kaŝobservis ĉe la alia ekstremo de la ponto, ricevis la leporon en sian sakon, sed kiam li vidis, ke estas nur leporo, li ekkaptis ĝin furioze kaj forĵetis ĝin kontraŭ la ponto, kaj, ĉar la anĝeluso sonoris en la sama momento, la maliculo, elsputante malbenojn, malaperis en la fundon de la kavaĵego.

De tiu tempo la leporo vidiĝas kontraŭ la ponto.

Kaj pro tio oni diras, ke la virinoj superruzas la diablon.

Buscières d'aillac, Franclando, tradukis F.B.

---

### MISKOMPRENO.

Maljuna virino havis hundon, kiun ŝi tre amis! Sed la besto iĝis malsana kaj ne resaniĝis.

Kvankam malriĉa, ŝi decidis venigi kuraciston. Li esploris la malsanan hundon kaj fine deklaris: „Kara virino, la besto estas grave malsana! Malgraŭ tio mi tamen esperas, ke ĝi resaniĝos! Mi sendigos kuracan trinkaĵon, sed ne forgesu: antaŭ la uzo bone skui!”

„Skui, sinjoro?”

„Jes! Ju pli forte, des pli bone! Post kelkaj tagoj mi revenos!” Post du tagoj la kuracisto ree venis al la maljuna virino kaj afable demandis: „Nu, kiel ĝi nun fartas?”

„Ve, sinjoro, mi ĵus enterigis la karan beston! Mi jam atendis tion ... la skuado ne estis bona ... ĝi restis morta en miaj brakoj ... Kредu al mi, sinjoro, tiu skuado mortigis mian Kastor!...”

La kuracisto skuis la kapon kaj foriris.

Leeuwarden, Nederlando.

Adapte trad. B. R.

---

Elektu en ĉiu esp. grupo amikon de „La Juna Vivo”, kiu ponumere vendos la revuon.

## IMPRESOJ DE BOVINO.


Iun tagon mi preteriris herbejon, kiu kuŝas apud ĉefvojo. Malantaŭ la barilo mi vidis bovinon, kiu rigardis la preterirantojn. Ĝi ankaŭ fikse rigardis min, kiam mi alproksimiĝis, kiel bovinoj ofte faras. Ŝajne ĝi volis ekbabili kun mi.

Mi haltis, etendis mian manon trans la barilon kaj gratis ĝian kapegon, demandante: „Ĉu interesa tio, kion vi vidas pasadi?” „Oh, jes,” ĝi respondis: „dum miaj liberaj minutoj mi tre ŝatas observi la pasantojn, precipe la aŭtomobilojn.” „Kaj kiaj estas viaj impresoj pri aŭtomobiloj?” mi demandis. „Ili estas grandegaj bestoj kun grandaj okuloj, kiuj lumbrilas dumnokte. Kiam du el ili renkontas sin, ili kvazaŭ ignore sekvas sian vojon, aŭ interfrakasas sin. Meza vojo ne ekzistas. Oni povus meti ilin en herbejon; ili ne pastiĝus, ĉar ili mem ne povas nutri sin. La homoj ĉiam manĝigas kaj trinkigas ilin. Ili kuras ne tiel rapide, kiel oni kutime kredas: foje persekutis unu mian amikino dum longa tempo sur mallarĝa vojeto. La granda besto spiregadis kaj kriegadis, sed ĝi iris malpli rapide ol mia amikino, kiu trankvile povis atingi sian ejon. La paseroj malŝatas tion, kion ili postlasas sur la vojo. Ĉu ili amas? Neniam mi vidis ilin pare iri. Ili pasas, indiferentaj pri tio, ke mi observas ilin. Sed iun tagon unu senhonte detruis la barilon kaj kuŝiĝis en nia herbejo. La homoj forlasis ĝin kaj ĝi pasigis la nokton ĉe ni. Mi klopodis ekbabili kun ĝi, sed vane. Ĉe la tagiĝo venis la patrino kaj fortrenis ĝin per longa ŝnuro. Ĝi foriris, ne dirante unu solan vorton. Kaj kiam mi deziris: „Bonan vojaĝon”, la patrino, pli ĝentila ol ĝi, respondis min.”

Laŭplaĉe prilaboris Pikilo.

Harlemo, Nederlando.

## KRAD-ENIGMO.




a, a, b, e, e, i, i, l, l, o, o, o, o, o, o, v.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. Beston.
2. Frukton.

B. R.

Riga, Letlando.



### LA NAŬA LECIONO.

- |           |            |                 |
|-----------|------------|-----------------|
| 1. tigro  | 5. leono   | 9. pantoflo     |
| 2. muŝo   | 6. hirundo | 10. poŝo        |
| 3. araneo | 7. pupitro | 11. poŝtuko     |
| 4. bovino | 8. dorso   | 12. okul-vitroj |

1 unu	6 ses	0 nulo	20 dudek
2 du	7 sep	100 cent	70 sepdek
3 tri	8 ok	1000 mil	78 sepdek ok
4 kvar	9 naŭ	11 dek unu	200 ducent
5 kvin	10 dek	12 dek du	

5789 kvinmil sepcent okdek naŭ; 1643 mil sescent kvardek tri.

### EN LA LERNEJO.

La klaso kalkulas. La instruisto diras: „Atentu! Atentu!”

La tri infanoj tuj staras en bona ordo kaj rigardas al la nigra tabulo.

Nun la instruisto **komencas**: „Ni nombru de unu **ĝis** dek!”

La klaso kaj la instruisto: „Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek!”

La instruisto: „Karlo, venu ankaŭ al la tabulo kaj legu en Esperanto de unu **ĝis** dek!”

Karlo ne **aŭskultas**. Li babilas kun alia knabo.

La instruisto iras al li kaj **demandas**: „**Kial** vi ne aŭskultas?”

Li ne **kuraĝas** paroli kaj **silentas**.

„Iru al la angulo!”

Nun li staras dum mallonga tempo en la angulo. La manoj estas sur la dorso.

La instruisto: „Ni **daŭrigu!** Joĉjo, **kiom da** oreloj vi **havas?** Manĵo, **kiom da** okuloj vi **havas?**”

La infanoj bone respondas. Ili estas tre inteligentaj.

La instruisto: „**Skribu hejme**: Kiom da pordoj, seĝoj, fenestroj, floroj, libroj, bildoj, k.t.p. estas en via ĉambro! — Kaj nun ni kalkulu!

Kiom estas kvin **kaj** kvin? Sep kaj tri? Kvar kaj du? k.t.p. Bone!

Kiom estas naŭ **minus** tri? Kvin minus tri? Ok minus sep? k.t.p.

Bone!

Nun ni nombru de dek **ĝis** cent!”

La klaso kaj la instruisto: „Dek, dek unu, dek du, dek tri, k.t.p. **ĝis** cent.”

La instruisto: „Kiom estas kvar**oble** sep, trioble sep, kvinoble ses, k.t.p. Nun ni finas.”

Poste li rakontas el „La Juna Vivo” No. 1:

Muŝo **promenis** sur la plafono en la lernejo, kaj aŭskultis al la instruisto kaj al la infanoj. „Kiuĵ bestoj estas danĝeraj?” **demandis** la instruisto.

La infanoj **respondis**: „La leonoj, la tigroj, la ursoj.”

Sed kun granda miro **zumis** la muŝo: „Leonoj, tigroj kaj ursoj ne estas danĝeraj bestoj! Tute ne! Danĝeraj bestoj estas la hirundoj kaj la araneoj!”

- a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- c. Lernu parkere la rakonteton de „La danĝeraj bestoj”, kaj recitu la enhavon en via esperanto grupo.
- d. Tre taŭga por ĉi tiu leciono estas la ludo el „La Juna Vivo” No. 8, „Sep estas tro multe.”

Kie estas la poŝtuko? Kie staras la pupitro? Kio estas en la pu-

pitro? Kie estas la okulvitroj? Kiuj kalkulas? Kie staras la tri infanoj? Ĉu Karlo aŭskultas? Ĉu la instruisto iras al li? Ĉu Karlo parolas? Kie staras Karlo nun? Kie estas la manoj de Karlo? Kiom da seĝoj, tasoj, floroj, lampoj estas en la ĉambro? Kiom estas kvin kaj du? Ok kaj dek kvin? Kiom estas tridek du minus sep? Sesdek ok minus dek ok? Kiom estas sesoble naŭ, kvinoble ok?

Kie promenis muŝo? Kie estis la plafono? Kie parolis la instruisto?

Kun kiuj parolis la instruisto? Kiuj bestoj estas danĝeraj? Kio promenis sur la plafono? Ĉu la infanoj respondis?

Respondu al la demandoj.

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Aperis artikoloj aŭ notoj pri „La Juna Vivo” en: „Ju Japana Gazeto”, „Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista” No. 36, „Het Kind”, „Argentina Esperantisto” No. 102—103.

2. La redaktoro de semajna junulargazeto en Bulgarlando (Veseladrujina” esperante „Gaja Kompanio”) petis al mi la rajton regule traduki rakontojn el „La Juna Vivo” por sia revuo. Mi permesis, kondiĉe ke li subskribu „El „La Juna Vivo”, internacia esperanto-gazeto por la junularo.” En la lastaj numeroj jam aperis „La azenoj el No. 1 kaj „Multekosta interbatado” kun bildoj el No. 2.

Mi esperas, ke baldaŭ multaj sekvu tiun bonan ekzemplon. Por la esp. movado ĝi estas multvalora.

3. La abonantoj, kiuj loĝas en landoj, kie ne estas reprezentanto, pagu per poŝtmandato, 8 respondkuponoj aŭ bankĉeko.

#### KORESPOND-ADRESOJ: ĉiu vorto: 0.03 gld.

**Nederlando:** Sendu f 0,30 aŭ du respondkuponojn al la redakcio de „La Juna Vivo” kaj vi ricevos 10 diversajn esperantajn gazetojn.

#### KALENDARO POR 1935

Okaze de Kristnasko aŭ Novjaro sendu viajn bondezirojn per **kalendara poŝtkarto por 1935.**

Klarlegebla, dukolore presita sur fortika kartono, ĝi estas donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron. — Prezo aŭ frankite 20 ekz.: hgld 0,55; specimene 4 ekz. por unu respondkupono aŭ hgld 0, 12½.

Du modeloj haveblaj: No. 1101 presita laŭlonge, No. 1102 presita laŭlarĝe faldebla en la mezo). Eldonejo: H. E. O.-Soesterberg, Holando. Poŝtkonto 88015.

#### REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;  
⅙ paĝo: 2 gld.